

## NOTOJ PRI KELKAJ SUFIKSOJ SISTEMATIKAJ KAJ PRISKRIBAJ EN BIONTOLOGIO

de A. ALBAULT (Francujo).

### I. Sistematikaj sufiksoj.

1. *-ide-\** kaj *-ine-\** en Zoologio. Wüster<sup>1)</sup> (p. [66]) skribas: „Anstataŭ L *-id-* kaj *-in-* uziĝis ĝis nun la formoj E *-oid-* kaj *-oin-*. Intermiksoj kun la jama komunlingva signifo de *-id-* resp. de *-in-* tiel estas evitataj.”

Tiu ĉi uzo havas du malavantaĝojn:

1°. Misformado de la internaciaj vortoj:

L *Cervidae*, G *Zerviden*, F *Cervidés*, sed E Cervoidoj;

L *Cervinae*, G *Zervinen*, F *Cervinés*, sed E Cervoinoj.

2°. *-oid-* internacie jam havas pli vastan signifon (*simila al*), kio povas krei konfuzon: a) ĝenerale, b) aparte en la sistematiko mem; ekz. *Culicoides* (ĉu kuloido?) ne estas el la „*ceratopogonidae*”.

Nu, ni rimarku, ke la latina sufikso *-id-* (same por *-in-*) estas uzata nur plurale: *-idae* (resp. *-inae*). Tiun pluralon oni vestis nacilingve (G *-iden*, F *-idés*). Koncerne la francan, ĝi do tute ne estas la pluralo de la transskribo de la sufikso: tiu ĉi pluralo estus *-ides* aŭ *-ites*. Ĝi fakte estas la asimilo de la plurala formo: efektive *-idae* kaj *-idés* same sonas (same por *-inae* kaj *-inés*). El tio rezultas, ke france oni povas ĝin uzi singulare: *un cervidé*.

Tio kondukas al la propono uzi la francajn formojn de tiuj latinaj sufiksoj: do *-ide-<sup>2)</sup>* kaj *-ine-*. Ekz.: La muŝideoj dividiĝas en pluraj subfamilioj: muŝineoj, glosinineoj, stomoksidineoj, ktp.

Ke jam ekzistas la vorto „*ide-o*” kaj la botanika sufikso *-ine-*, verŝajne ne multe ĝenos. Sed oni eble povus uzi la sufiksojn sub la modifitaj formoj: *-ida-* kaj *-ina-* (muŝidao, muŝinao ktp.) kiuj konservus al la internaciaj formoj ilian aspekton kaj forigus ĉiun konfuzebilon.

Pri tio, ke tiuj sufiksoj aldoniĝu al esp-a radiko (muŝideo, cervideo) aŭ en iuj kazoj, al esp-a transskribo de la koncerna latina radiko (ekvideo, kanideo, felideo) vidu Wüster (Esperantologiaj principoj E). Samloke vidu pritrakton de la demando pri la nomoj de specioj. (Eble duonasimilo, kiu konservus la latinajn finaĵojn, estus kontentiga. Aŭ — ĉar nur fakuloj uzas tiujn terminojn — plej simple estus konsenti inter esperantistoj pri prononco de la latina).

2. Sufikso *-e-\**: a) Anstataŭ *-ul-*, sed nur en la sistematiko. Ĝi aldoniĝas al nomo de karakterizilo: Cili-eoj, Flagel-eoj, vertebr-eoj (samaj ĉe Wüster, sed kun *-ul-*). Komparu F *Ciliés*, *flagellés*, *vertebrés*. Plie ronĝ-eoj (por eviti rod- jam signifohava, F *rongeurs*) palmopied-eoj = palmipedoj, ĉiropied-eoj = ciripedoj, ktp.

b) Aldoniĝas al „priskriba nomo” por striktigi ĝin al sistematika signifo, ekz.:

*karnivoro* estas iu ajn karnomanĝulo (ekz. ankaŭ insekto).

*karnivoreo* estas nur ordo el la mamifereoj.

(c) ĝi jam internacie formas tribonomon, kiam ĝi estas aldonata al *botanika* genronomo (Wüster: *migdal-eoj*, *citin-eoj*.)

Rim. por signifo a) oni povus pensi pri ebla sufikso „*-at-*”, sed nur por kelkaj okazoj, ĉar ĝi estus tro sentata kun signifo „provizita per”, pro ioma internacieco kaj precipe pro la partecipo *-ata*. Ĝi havus tro malvastan uzon kaj do ne estus sufiĉe oportuna.

### II. Priskribaj sufiksoj.

Biologoj kaj la popolo bezonas priskribajn nomojn por animaloj kaj vegetaĵoj. La diferenco inter tiuj nomoj kaj la sistematikaj estu klarigata helpe de ekzemplo.

Se oni volas nomi karnomanĝantan estaĵon, oni povas uzi la vorton „*karnivoro*”, kaj tiu vorto konservas sian primitivan signifon de „estaĵo kiu karakterize nutras sin per karno”. Ĝi do povas esti aplikata al tre diferencaj estaĵoj: karnivoraj vertebr-oj, insektoj, vegetaĵoj.

Sed la sistematiko bezonas multajn „etikedojn” por nomi la sennombrajn grupojn de la faŭno kaj flaŭro. Do ĝi jam kontentas, se ĝi trovas iun karakterizilon, kiu permesas fabriki tiun etikedon. Poste ĝi eble konstatos, ke tiu karakterizilo ne estas specifa aŭ eĉ ne la plej grava por la koncerna grupo: sed la etikedo, malviva, kvazaŭ ŝtoniĝinta vorto, restos. Tial tre taŭgas kaj konvenas la senvivaj nomoj latinaj por specioj kaj genroj: ili klare apartigas la sistematikajn nomojn de la priskribaj. Saman rolon volas ludi la sufikso *-e-*: Karnivoreo ne plu estas iu ajn karnivoro, sed nur ordonomo de mamifereoj.

Tiel la du nomkategorioj klare kaj plene apartiĝas ne nur ideo, sed ankaŭ vorte: Oni klare kaj daŭre perceptas ideojn, nur se ili sone konkretiĝas. Kaj se poste oni uzos sistematikajn nomojn ankaŭ en priskribaj tekstoj, tio jam estas alta afero.

Jen kelkaj priskribaj sufiksoj:

1. *-ul-* Ekz. *Ruĝgorĝ(ul)o*; *krucbekulo* (Wüster: *A Cross-bill*, F *bec croisé*, G *Kreuzschnabel*); *falvulo* (besto kun pale flava felo: „falva” koloro). Kp. sub I, 2, a kaj b).

Pli laŭcele estus lasi tiun sufikson nur por la signifo „homo” (riĉulo, grandulo, longkrurulo ..... ) kaj enkonduki alian por aliaj estaĵoj. Atentinda estas la propono de G. Hamming uzi la sufiksojn: *-efo* por vivaĵoj, ĝenerale kaj *-ilso* por bestoj ĝenerale (vd. S.R. 2 44).

2. *-je-\** „Vegetaĵo karakterizita de .....” Ekz.:

Pom-jeo (pomarbo), frag-jeo (fragplanto), te-jeo (tearbeto), frukt-jeo.

Tiu sufikso estis plurfoje proponita sub formo: *-jero*. Sed la formo *-jeo* ŝajnas pli ĝusta. Ĝi efektive devenas de la franca *-ier* (pr. *-je*), sed ne de *-ière* (pr. *-jer*). Komparu la du vortojn: *théier* (teje) = tearbo kaj F *théière* (tejer) = tekruĉo.

3. *-ivoro\** „estajo, kiu karakterize nutras sin per io”: herbivoro, karnivoro, insektivoro (ĉiuj tri jam ĉe W ŭ s t e r, la du lastaj kun signifoj: 1) *-ivoro*; 2) *-ivoreo*). Plie: fruktivoro, sangivoro, lignivoro, sterkivoro, ktp. Homo estas „divers”-*ivoro* (li ja ne manĝas ĉion!)

4) Diversaj aliaj sufiksoj devenigitaj el „latinismaj vortoj” povus esti utilaj: ekz. *-ikolo\** = „estajo, kiu vivas, loĝas en .....”. Kelkaj tiaj sufiksoj eliras el nura biologia uzo: ekz. *-ifera\**: „kiu portas, enhavas”: mamifera besto, sed orifera grundo (ne similas al „sabloza grundo”), lanifera ŝafo, rezinifera arbo.

*icido*: „io, kio mortigas” ..... (jam uzita de D-ro Paul Neergaard — Somera Universitato Malmö). Ekz.: insekticido, paraziticido, herbicido, gameticida medikamento, ktp. Sed plie en la juro: „iu, kiu mortigis iun”: hom-, reĝ-, patr-, frat-, infan-, kaj ankaŭ gent-*icido* (prefere al: genocido).<sup>4)</sup>

### III. Teknika esprimo de sekseco ĉe bestoj.

x anstataŭas radikon.

*x-o* 1. Vulgara nomo de grupo (raso, specio, genro, familio, ordo, klaso, filumo, ktp.).

Ekz. aligato = aligatorideo; birdo = klaso de vertebejoj.

2. Iu ajn el tiu grupo de masloj, inoj aŭ idoj).

Ekz. grego el 50 alkoj.

3. Maslo ĝenerale, reproduktiva aŭ ne, diference de ino kaj idoj.

Ekz. tigro kaj tigrino.

4. Reproduktiva maslo por kelkaj.

Ekz. koko (virkoko) kaj kapono.

5. Nereproduktiva maslo por kelkaj; (ŝajne evitinda).

Ekz. bovo kaj taŭro.

*x-oĉo\** (arteformita apud -ĉj- analogie al -in- apud -nj-) = „Reproduktiva maslo” (= vir-x-o, x-viro, x-maslo). Kp. *x-o* 4. Ekz. Taŭro estas batal-bovoĉo. Kokoĉo (F *coq*); ĉevaloĉo aŭ stalono<sup>3)</sup>; kaproĉo aŭ boko<sup>3)</sup>.

*x-atro\** (de la franca *-atre*, aĉsignifa. Ĝi plie memorigas la vorton: katri) = „Nereproduktiva maslo” (kastrita *x-o*, eks-x-viro<sup>3)</sup>, eksvir-x-o<sup>3)</sup>, eks-x-maslo). Kp. *x-o* 5.

Ekz. Bovatroj tiras la plugilon. Grasa kokatro aŭ kapono (F *chapon*).

*x-ino* Idonaskanto. Kp. *x-o* 2.

Ekz. bovino kun siaj bovidoj. Kokino (F *poule*); plie kokinatro (F *poularde*) estas nereproduktiva ino.

*x-ido* Naskito. Kp. *x-o* 2.

Ekz. kokido (F *poulet*).

*x-eto* 1. Malgranda raso ktp. (respondas al *x-o* 1, 2).

Ekz. ĉevaleto = ponio.

2. Juna *x-o* 3, 4, 5;

Ekz. koketo [pli precize: kokoĉeto (F *cochet*) kaj kokineto (F *poulette*)] kokideto (F *poussin*). Bovĉeto (F *taurillon*); bovatreto (F *bouvillon*); ktp.

<sup>1)</sup> Eugen W ŭ s t e r: Enciklopedia vortaro Esperanta-Germana (Leipzig 1923). Partoj II-III entenas la Esperantologiajn principojn (§ E „Pri la nomoj de bestoj kaj plantoj).

<sup>2)</sup> Temas pri la zoologia sufikso! Ne pri la botanika *-oid-* por subfamilio.

<sup>3)</sup> Menciita en „Plena Gramatiko” de Kalocsay kaj Waringhien.

<sup>4)</sup> Tre maloportune estas ke respondaj vortoj nacilingvaj (ekz. anglaj) signifas jen — mortigon, jen — mortigulon, jen havas ambaŭ signifojn. Eble pli oportune estus doni verban karakteron al tia sufikso: insekticidi, insekticido = ago -i; insekticidajo aŭ insekticidilo; genticido; genticidantoj. (Noto de la Redaktoro).

\* signas proponitajn neologismojn.

914.83 : 546.96 : 001.4 = 089.2

Sinjoro Redaktoro,

Vi demandis en „*Scienca Revuo*”, vol. 2a, nro 4a, paĝo 133, ĉu *Rutenio* povus roli kiel geografia nomo.

Laŭ mia opinio, *Rutenio* estu uzata en Esperanto ne kiel geografia nomo pro jenaj kialoj:

1e la geografia nomo *Rutenio* (*Ruthenia*) estas malnoviĝanta, ĉar la popol-politika problemo, per kiu ĉi tiu nomo estiĝis, nun estas forigita per la aligo de la koncerna teritorio al Sovet-unio.

2e la teritorio, kiu estas nomata *Rutenio* (*Ruthenia*), ne estas ekzakte difinita. Kelkfoje oni nomas tiel Ukrainion (almenaŭ en Germanio), pli ofte la okcidentan parton de Ukrainio (apartenintan al la tiama Austri-Hungaria monarkio), kaj plej ofte tiun teritorion, kiu ankaŭ nomiĝas Karpato-Rusio, kaj apartenis dum 1918-'39 al Ĉeĥoslovakio, dum 1939-'45 al Hungario kaj nuntempe al Sovet-unio.

3e ekzistas anstataŭ *Rutenio* aliaj nomoj novaj kun pli ekzaktaj signifoj: a) Ukrainio (Malgrand-Rusio); b) Okcidenta Ukrainio, Orienta Galicio; c) Karpato-Ukrainio, Karpato-Rusio. *Rutenioj* = a) ukrainoj (malgrand-rusoj); b) rusniakoj (okcident-ukrainoj). *Rutena lingvo* = ukraina lingvo.

Oni klare vidas, ke la geografia nomo *Rutenio* estas nenecesa, eĉ evitinda, kaj sekve sen ia rolo. Tial oni povas uzi la vorton *Rutenio* kiel nomo de la elemento n-ro 44, sen skrupuloj pri homonimeco kaj eventuala miskomprenleco.

Herbert Runtze.